

1. Libro servo kaj biblioteko de CxEa en novaj ejoj.

Cxar la luanto de la ejoj en Běchovice nuligis la kontrakton, ni devis movi la libroservon kaj la bibliotekon al Dobřichovice (20 min. per trajno de la stacio Praha-Smíchov). Kvankam la luprezto estas la sama (ecx iom pli modera), la ejoj estas pli grandaj kaj do ekde menciota tempo eblos gxin viziti ankaux persone, tamen ne estos regulaj horoj, do nur post individua interkonsento kun la cxefo de la libro servo kaj biblioteko "Zdenek_Pluhar" <m.pluharova@worldonline.cz>. La persona viziteblo validas provizore nur por la membroj de CxEa. Eble, se la frekvenco de la vizitoj estos malofta, ni malfermos tiun eblon ankaux por la nembroj.

2. Kompletigo de la Esperanto-arangxo en Cxehxio:

2003-09-20: Esperanta tago en Pardubice, Kontakto: <josef.hron@vakpce.cz>

2003-10-17/19: CxEa-konferenco en Litomyšl. Kontakto: (prosím doplnit, o tom jsme nemluvili: Věrka?, Pavel?, Liba?)

3. Libromondo kaj Karel Capek

Jxauxde la 24-an de aprilo estis inauxgurita granda libro-ekspozicio Libromondo 2003 en granda foirejo de Prago, kie multaj cxehxaj eldonejoj prezentis siajn produktojn. En unu vitrino aperis ankaux ekspozicieto pri Esperanto-libroj, kiun prizorgis poetino Vera Ludikova. Dank' al sxi ankaux okazis en saloneto por cxirkaux 50 personoj je la 15-a horo prezento de Esperanto kaj je la 16-a horo sxia auxtora posttagmezo. Sxi prezentis sian novan libron "Pořli to dál" (Sendu gxin pluen) kun tradukoj en plurajn lingvojn inkluzive de Esperanto (tr. J. Mraz, legis J. Vich). En la unua programo estis ecx tro multe da Esperanta legado kaj kantado, cxar la gvidantoj forgesis, ke la programo estas destinita por NEesperantistoj, el kiuj bedauxrinde multaj forkuris.

Vendrede posttagmeze en la somera ripozloko de Karel Capek en Strž, iom flanke de la civilizacio, en sino de bela naturo apud lago, estis inauxgurita ekspozicio pri la alilingvaj tradukoj el la verkoj de Karel Capek. Jam en la unua saloneto aperis du tradukoj al Esperanto (Posxrakontoj kaj Milito kontraux Salamandroj) kaj en la supra etagxo ankoraux La blanka malsano. Grupeto da esperantistoj tie lasis ankaux kelkajn materialojn pri Esperanto (prizorgis ing. M. Turkova). Esperantistoj ankaux prizorgis du japanlingvaj tradukojn, el kiuj oni ekspoziciis bedauxrinde nur unu.

4. Virtuala UK 2003 por nekongresanoj:

laŭ la informo de UEA, la cxijara 88-a Universala Kongreso, okazonta en Gotenburgo, Svedio, funkciigos ankaŭ t.n. virtualan kongresejon, en kiu nekongresanoj povos sekvi la laborojn de la kongreso lege, bilde kaj auxde. Tio estos la unua klopodo, tial pionira. Krom legi kaj auxdi pri la diversaj arangxoj, eblos sendi mesagxojn al cxiaj kongresanoj (cxia ricevos propran retadreson, kiu funkcios nur dum la kongresa semajno), pridiskuti la kongresan temon kaj auxskulti eldirojn de kongresanoj. La virtuala kongresejo funkcios cxie la adreso www.uk-2003.net. Sed atentu! Tiu reteja adreso ankoraŭ ne estas aktiva!